

5/2018

Septembro
Oktobro

ISSN 0032-2431

Pola Esperantisto

Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Litvo patrujo mia...
- ★ Klimato: Mi ne estas optimista
- ★ Sekva sukcesa traduko de pola literaturaĵo

Pola Esperantisto

Dumonaĵa revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

Eldonanto

Pola Esperanto-Asocio
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a
00-159 Warszawa
<http://www.esperanto.pl>

Ĉefredaktoro

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

Kunlaboro

T. Nemere, M. Tatara,
A. Wilkus,

ABONOJ

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj
eksterlando - 20 eŭroj
Cifereca (pdf)
Pollando - 25 zlotoj
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu
adreso estu sendata la revuo.

ATENTO

Abonoj per eŭroj validas post aldono
de 5 eŭroj por la bankaj kostoj.
Polan Esperantiston eblas aboni per
Konto de PEA en UEA: peaa-v;
Detaloj troviĝas ĉe:
http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Estraro de PEA

Aleksander Zdechlik - prezidanto
Teruo Matsumoto - vicprezidanto
Robert Kamiński - sekretario
Alina Mozer - kasisto
Agnieszka Mozer - estrarano
Marek Mazurkiewicz - estrarano

Ĉefdelegito de UEA

Stanisław Mandrak:
stanislaw.mandrak@gmail.com

Peranto de UEA

Jan Skonieczka: jaskon@op.pl,

Pri la skribitaj artikoloj
respondecas
la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn
oni ne resendas.
La redakcio rezervas al si
la rajton mallongigi
kaj korekti la tekstojn.
Represo kaj tradukoj nur
kun indiko pri la fonto



Pola Esperanto-Asocio
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Jerzy Handzlik koncertas dum Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

Enhavo

Redaktoraj vortoj	2
Eventoj	
<i>Teresa Nemere</i> , Patro de Esperanto-poezio omaĝata en Toruń	3
<i>Adam Wilkus</i> , La unua UK en Portugalio	5
<i>Robert Kamiński</i> , Sekva sukcesa traduko de pola literaturaĵo	9
<i>Henryk Borkowski</i> , Mia legado de „Antaŭprintempo”	11
<i>Robert Kamiński</i> , Nova Zamenhof/Esperanto-Objekto en Bjalistoko	12
Mojose	
<i>Rafał Mościński, Małgorzata Sopińska</i> , Nia unua E-aranĝo	12
Raportoj, rakontoj	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Litvo patrujo mia... 1-a parto	14
<i>Krzysztof Śliwiński</i> , Preterlasita datreveno: 250 000 artikoloj en la Vikipedio en Esperanto	18
Pri kio ni aŭdas	
<i>Jean Marc Leclercq</i> , Klimato: Mi ne estas optimista	19
<i>Magdalena Tatar</i> , Granda sukceso de polaj volejbalistoj	21
Vizitindaj lokoj	
<i>Robert Kamiński</i> , Centro de Scienco EC1 en Łódź	22
Homoj	
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , Hilary Koprowski – la belanima sciencisto	25
<i>Adamo Ząbek</i> , Johano Kawka el Tychy	27
Lingvosciencia angulo	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , „La” – specialaj uzoj – 1-a parto	28
Literaturaĵoj	
Stefan Žeromski „Antaŭprintempo”	30
Saĝulaj pensoj	
<i>Andreo Bach</i> , Kiel aĉeti feliĉon	35
Leterkesto	
<i>Aleksander Zdechlik</i> , Kongreso aŭ nekongreso	36
<i>Adam Wilkus</i> , Eksterordinara astronomia evento antaŭ UK	37
Kalendaro	38
Oni eldonis	
”Antaŭprintempo”, “La tempo de la kaprinoj”, “Landoj de l Fantazio”, “Songe sub pomarbo”, “Hotelo Savoy”, „Poemete”	40
<i>Estraro de PEA</i> , Represo de „Sinjoro Tadeo”	42
<i>Robert Kamiński</i> , Konata vortaro denove aĉetebla	43
Forpasis	
Jan Kawka – Tychy	43
Tadeusz Wesse – Łódź	43
Nia fotogalerio	44

Estimataj legantoj!

Jam proksimiĝas fino de la jaro 2018. Venis aŭtuna malvarmo kaj ni pli volonte rememorigas someran tempon kaj somerajn travivaĵojn. Ni promesis skribi pri Universala Kongreso en Lisbono. La promeson plenumis Adam Wilkus, priskribante siajn travivaĵojn dum tiu ĉi UK.

Mallongaj tagoj kaj aŭtuna vetero instigas nin al legado. Ĉijare, kadre de la pola kampanjo Nacia Legado, aperis la unua traduko de la fama kaj grava pola verko de Stefan Żeromski – “Przedwiośnie” esperantlingve “Antaŭprintempo”

La kampanjo estis komencita en 2012, okaze de la 200-a datreveno la invado de Napoleono al Rusujo. Gravaj historiaj okazintaĵoj en la malliberigita Pollando kiu estis priskribita en la pola epopeo “Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz. La Legado estis organizita laŭ la iniciato de la Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski. Oni volis, ke nacia literaturo ne estu legata nur en lernejo, sed ankaŭ konata de larĝa publiko. La publika legado de “Sinjoro Tadeo” okazis la 8-an de septembro 2012, en dekoj da urboj, kun partopreno de amaso da aŭskultantoj. Esperantistoj partoprenis en la legado de „Sinjoro Tadeo” kaj en ĉiuj sekvaj tiu tipaj eventoj. Ĉi-jare ni legis verkon de Stefan Żeromski. Pri la unua prezentado de la libro, vi povas legi en la raporto pri bjalistoka prezento de la traduko kaj legi fragmenton de tiu ĉi verko en la ĉapitro *literaturaĵoj*. Ni rememorigas, ke ankoraŭ eblas mendi la plej novan eldonon de “Sinjoro Tadeo” Legu pri tio sur la paĝo 42.

En la nuna numero, inter aliaj, mi rekomendas legi pri kunlaboro politova kunlaboro priskribita de Roman Dobrzyński kaj la artikolon de Teresa Nemere pri omaĝo de Antoni Grabowski en Toruń.



NARODOWE
CZYTANIE

08.09.2018

Robert Kamiński

STEFAN ŻEROMSKI

Przedwiośnie

PATRONAT HONOROWY PARY PREZYDENCKIEJ



1918-2018

Eventoj

Teresa Nemere

Patro de Esperanto-poezio omaĝata en Toruń

Ĉiu urbo fieras pri siaj eminentaj loĝantoj. En Toruń oni fieras pri multaj interesaj personoj – pri la larĝe konata en la mondo scienculo Mikołaj Kopernik, kaj ankaŭ pri postaj eminentuloj, riĉigantaj la polan kulturon, kiel Samuel Linde, Fryderyk Skarbek, Wisława Szymborska, ĉu la nuna, fama prof. Andrzej Wolszczan. En la 3-a volumo de la eldonata en nia urbo *Toruna Biografia Vortaro*, inter multaj aliaj, troviĝas la biografio de Antoni Grabowski, en Esperantujo konata kiel „patro de Esperanto poezio”.



Antoni Grabowski, naskiĝinta en la jaro 1857 en Nowe Dobre apud Chełmno, dum la jaroj 1873 – 1879 estis lernanto de la Toruna Urba Reala Gimnazio, kie li ricevis abituriantan diplomon. La konstruaĵo de la gimnazio konserviĝis ĝis hodiaŭ kaj nun estas konata kiel sidejo de Nikolao Kopernik Liceo. Dum kaj post studoj en Wrocław, A. Grabowski vizitadis en Toruń

siajn parencojn (ĉe la nuna strato Szczytna 16, loĝis lia fratino) kaj tie, kion li mem rememorigis poste en Pola Esperantisto, somere en 1887, li aĉetis freŝe eldonitan, la unuan lernolibron de la internacia lingvo, kreita de L. Zamenhof.

A. Grabowski tuj entuziasmiĝis pri la lingvo, vizitis kaj amikiĝis kun ĝia aŭtoro, kaj tuj komencis traduki al Esperanto diversajn literaturaĵojn, plej ofte verkojn de polaj poetoj kaj romanverkistoj.

Simile agis ankaŭ aliaj polaj esperantistoj. Dank' al tio kun la pola literaturo povis renkontiĝi esperantistoj el diversaj landoj. Tio estis speciale grava, kiam Pollando, pro manko de sendependeco, ne havis eblecojn promocii sian kulturon. La plej grava kaj ĝis nun alte valorigata traduko de A. Grabowski estas lia esperantigo de la epopeo de Adam Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*. Valoras rimarki ke la traduko unuanfoje ekaperis jam en la jaro 1918 kaj poste estis eldonata en 1955, 1987 kaj en 2015. Interesiĝo pri la traduko daŭras. Mi mem rimarkis tion en Finnlando /1976/ kaj en Japanio/2001/, kiam la renkontitaj esperantistoj demandis min pri A. Mickiewicz kaj petis klarigojn pri la historiaj okazintaĵoj, signitaj egz. en *Koncerto de Jankjel*. La traduko estas ankaŭ tre grava por disvolviĝo de Esperanto mem, por la formiĝo de Esperanta, poezia lingvo.

Kiagrade la meritoj de A. Grabowski estas konataj de loĝantoj kaj aŭtoritatoj de nia urbo, estas malfacile kalkuli, sed en Toruń ekzistas kelkaj omaĝmemoraĵoj pri li kaj ni, esperantistoj, fieras pri tio kaj ĉiam strebas prezenti ilin ne nur al la esperantistaj gastoj, sed ĝenerale, al la vizitantoj de nia urbo.

En la jaro 1959, laŭ la decido de la Societo de Amikoj de Toruń, oni inaŭguris en nia urbo Antoni Grabowski-straton, omaĝante tiamaniere la faman esperantiston. Ek de la jaro 1986, la toruna junulara teatro „Studio „P”, laboranta ĉe la Junulara Kulturdomo, preparas elektitajn programojn, krom en la pola, ankaŭ en Esperanto. En la jaro 1988, kiam esperantistoj diversforme festis la datrevenon de la unua renkontiĝo de A. Grabowski kun L. Zamenhof, Studio „P”preparis interesan spektaklon „Sinjoro Tadeo”, surbaze de la fama traduko de A. Grabowski. La teatro ĝis nun preparis jam 11 esperantlingvajn



programojn kaj daŭre riĉigas diversajn Esperanto-aranĝojn.

La grava memoraĵo pri A. Grabowski troviĝas en la menciita supre lernejo, kiun vizitadis A. Grabowski. En la jaro 1998, kadre de la festata tiam la 430-a jariĝo de la lernejo, okazis la solena malkovro de memortabulo, omaĝe al la eminenta lernanto, sur kiu legeblas la teksto: *En tiu ĉi konstruaĵo, en la jaroj 1873 – 1879, lernis Antoni Grabowski, fidela filo de la tero de Chełmno, eminenta kemiisto- koloristo de ŝtofoj, kunverkanto de la pola kemia vortaro kaj kunfondanto de la Pola Kemiista Societo, la patro de Esperanto poezio, tradukanto de „Sinjoro Tadeo” kaj kunkreanto de Pola Esperantista Societo.* La tabulo estis fondita de la nepo de A. Grabowski – prof. Antoni Zbigniew Kruszewski. Samtage la lerneja kemia laborejo ricevis la nomon de la iama lernanto kaj poste fama kemiisto. De tiu tempo la lernejon vizitas esperantistaj gastoj kaj kelkfoje okazas tie renkontiĝoj de la gastoj kun lernantoj kaj diversaj prelegoj pri Esperanto.

Kaj fine kelkaj vortoj pri la lasta evento en Toruń, honore al A. Grabowski. Okaze de la festata ĉijare la 100-a datreveno de la unua preseldono de esperantigita de li „Sinjoro Tadeo”, la laboranta de kelkaj jaroj en la urbo, moderna, prestiĝa Centro de la Nuntempa Arto „ Signoj de Tempo”organizis, por la urba publiko „Vesperon kun „Sinjoro Tadeo”. Dum la aranĝo, la ĉeestantoj povis ĝui: la prelegon „ Antoni Grabowski – genia tradukanto”, prezenton de la elektitaj fragmentoj de la esperantigita verko de A. Mickiewicz, plenumo de la teatra aktoro, kaj muzikadon de cimbalisti – grizbarbulo, kiu mem diris, ke li similas al la fama Jankjel, priskribita en la epopeo. La vespero tre plaĉis al la publiko, kiu okupis ĉiujn lokojn en la kunvenejo.

La okazintaĵo estas la lasta nuna signo de la omaĝo rilate al Antoni Grabowski en Toruń. Ni esperu, ke ĝi ne estos la lasta.

Adam Wilkus

La unua UK en Portugalio

Somere 2018, mi partoprenis en la 103-a Universala Kongreso de Esperanto kune kun pli ol 1500 samideanoj el 75 landoj. La Kongreso okazis unuan fojon en Portugalio. La kongresurbo *Lisboa* (esp. *Lisbono*) - situas sur sep montetoj. Ĝi troviĝas ĉe la Atlantika Oceano, apud la rivero *Tejo* (esperante Taĵo), kies Esperantan nomon portis la kongresa kuriero *Taĵo nia*.

Lisbono estas historia urbo, el kiu, jam en la mezepoko, maristoj

esploris nekonatajn marojn kaj landojn, malkovrante, inter alie, la maran vojon al Hindio kaj al Brazilo, kaj ebligis al Japanoj kontakton kun Eŭropo.

Ĉiuj kongresaj eventoj okazis en kelkaj lokoj de la urbo. Solenan malfermon kaj internacian vesperon la kongresanoj spektis en la malnova teatro, en la historia urbo-centro. Aliaj programeroj, krom la kongresa balo, okazis en la kongresejo, troviĝanta en la Fakultato pri Juro de la Lisbona Universitato.

Mi aŭskultis diverstemajn prelegojn, interalie pri la kongresa temo: „*Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?*” ĉeokaze oni pridiskutis iaman koloniadon kaj lastatempan amasan enmigradon al Eŭropo, problemojn, kiuj rilatas al tiu procezo, eblecojn helpi, sencon uzi Esperanton tiucele ktp. Estis prezentitaj vidpunktoj kaj ideoj de reprezentatoj de diversaj landoj kaj kulturoj.

Grandan atenton vekis la prelego de Roman Dobrzański kaj Humphrey Tonkin, dediĉita al 100-jariĝo de Esperanto-traduko de la pola nacia epopeo „*Sinjoro Tadeo*” fare de Antoni Grabowski. Tiun prelegon ĉeestis polaj diplomatoj el la Pola Ambasado en Lisbono.

Okazis ankaŭ interesaj prelegoj pri Portugalio kaj, enkadre de la prelegserio „Portugala eksprese”, pri la portugala lingvo, parolata ankaŭ en Brazilo kaj en multaj iamaj kolonioj (ekzemple Timoro, Kaboverdo, Gvineo, Makao kaj Hindujo) Multaj partoprenantoj atendis prelegon pri la famaj lisbonaj tramoj. Tamen, montriĝis, ke la preleganto ne povis veni, do anstataŭe okazis improvizita ateliero pri la portugala lingvo. Ekplaĉis al mi tiu ĉi lingvo.

Ekinteresis min ankaŭ la diskuto pri diversaj ideoj, okazanta dum la kongresa Scienca Forumo. Oni parolis pri ebleco akiri sciencan kaj popularsciencan informon pere de fakaj revuoj, sciencaj organizoj, kiuj kunlaboras, interalie, kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

Mi ĝuis la belan artan programon. Interesaj estis koncertoj de la tradicia portugala *fado*-muziko, onidire kreita pro sopiro de maristoj pri la patrujo aŭ pri la foraj landoj. (laŭ aliaj, tiu muziko esprimas emociojn de la



maŭraj sklavoj)), ofte nomata “*la portugala bluso*”, koncertoj de la folkloraj grupoj *Grupo Etnográfico de Danças e Cantares Do Minho* el norda Portugalio kaj *Grupo Folclórico de Faro* el sudo de la lando (bele vestitaj paroj dancantaj kaj kantantaj akompane de popolaj muzikinstrumentoj) kaj koncertoj de la samideanaj artistoj: *JoMo, Kajto, Juliano Hernández Angulo, Martin Wiese, Georgo Handzlik kaj filino Dominika, Mikaelo Bronstein kaj Sergeo La Terura, Grazia Barboni, Gijom’* kaj aliaj. Belega estis ankaŭ koncerto de la *Internacia Koruso*.

Dimanĉe, dum la unua tago de UK, okazis bankedo kaj kongresa balo en la Kulturcentro de la lisbona kvartalo *Belém*, poste ni vizitis kelkajn interesajn arkitekturajn objektojn, monumenton kaj muzeojn.

Interesis min la plej granda en Eŭropo – monakejo

Mosteiro dos Jerónimos

konstruita en la specifa stilo (gotiko kun arabaj influoj, kiu enhavas tipe marajn elementojn ekzemple ŝip-mastojn), kie okazis gravaj eventoj, inter alie oni surskribis reformkontrakton kun la Eŭropa Unio, la monumenton *Padrao dos Descobrimentos*, sur kie en la ŝtona karavelo videblas inter aliaj skulptaĵoj figuroj de



Vasco da Gama, Ferdinando de Magellan, princo Henriko la Navigatoro, kaj ankaŭ proksiman fortikaĵon *Torre de Belém*.

Sur muroj de domoj, preĝejoj, en metrostacioj ni ofte vidis kahelojn, emajlitaj kaj ornamitaj per bildoj. Sur placoj kaj trotuaroj mian atenton kaptis surteraj mozaikoj - *Calçada portuguesa*. Mi venis al la maŭra *Castelo de São Jorge*, situanta sur unu el la montetoj en la historia centro de la urbo kaj ankaŭ mi vizitis belan *Muzeon de azulejos*, kie oni detale prezentas diversepokajn kahelojn.

Kun la granda intereso ni rigardis la plej grandan en Eŭropo akvarion en la kvartalo *Oriente*, kie eblas rigardi abundan maran flaŭron kaj faŭnon.

Bela vetero akompanis nin dum la tuta semajno, sed verdire estis eĉ tro varme! Suno brilis forte kaj temperaturo de aero ofte atingis 40 gradojn. Samtempe en aliaj partoj de la lando, kovritaj per arbaroj, oni informis ke okazis danĝeraj incendioj. Ni soifis kaj pro tio ĉiutage ni trinkis multon kaj ne nur akvon. Bongustis *Sangria* – malvarmigita ruĝa vino kun citrusfrukto, vinbero kaj pomo. Kun la granda apetito mi gustumis saladon de pecetigitaj fruktoj – melono, ananaso, mango, vinbero, kiu estis vendata en la universitataj manĝejoj.



En turismaj lokoj, bedaŭrinde, ĉiam aperas ŝtelistoj kaj kelkaj priŝtelitaj kongresanoj plendis pri tio. Feliĉe, mi havis nur bonajn impresojn renkontante simpatiajn lokanojn. Iu el ili avertis min pri la malfermita dorsosako, aliaj helpis trovi vojon. Plaĉis al mi ilia toleremo, kiam mi provis ankoraŭ mallerte komunikiĝi kun ili en la portugala. Tamen, plej volonte mi parolis en la “verda lingvo”, kiun, krom kongresanoj, uzis ekzemple la portugalaj junulinoj, laborantaj en la universitata manĝejo. Miaopinie la kongreso estis tre interesa kaj partopreninda!

Sekva sukcesa traduko de pola literaturaĵo

Sabate posttagmeze, la 8-an de septembro 2018, kadre de la Nacia Legado, en Bjalistoko estis legata en Esperanto, - "Antaŭprintempo" ("Przedwiośnie") de Stefan Żeromski.

En Bjalistoka Ludoviko Zamenhof Kulturcentro estis prezentita la esperantlingva eldono de "Antaŭprintempo". Tomasz Chmielik tradukis la libron de la originalo en Esperanton, danke al financado de la urba buĝeto de Bjalistoko. Ĝi estas la unua historia traduko en la internacian lingvon.

Partoprenantoj de la kunveno ricevis ekzempleroj de la tradukaĵo. La libroj estis stampitaj per la porokaza stampo.



Dum la renkontiĝo la prezidanto de la Esperanto-Societo de Bjalistoko Przemysław Wierzbowski rakontis, ke la traduko de "Antaŭprintempo" koincidis kun la anonco de la pola prezidento, ke dum ĉi-jara Nacia Legado estos legata "Antaŭprintempo". La traduko estis preparita okaze de la 100-a datreveno de la sendependeco de Pollando kaj oni planis prezenti ĝin en decembro 2018. dum Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. Tamen, la laboro estis finita pli rapide kaj jam septembre la traduko estis preta.

La tradukisto Tomasz Chmielik diris dum la unua prezentado de la eldonaĵo, ke la verko de Żeromski estas malfacile tradukebla. Li opiniis, ke grandpatre pro la lingvo kiu jam ne estas uzata. Lingvo de aŭtoro estas plena de diversaj lokaj vortoj, kiuj estis uzataj en priskribata epoko.

Intensa laboro pri la traduko daŭris kvar monatojn. Tradukisto diris, ke ekzistis problemoj kun la tradukado de propraj nomoj. Estis momentoj eksterordinare malfacilaj, ekz: priskribante kaleŝojn, li devis trovi multajn informojn, kiel tiaj kaleŝoj aspektis. Li ankaŭ diris, ke Żeromski kreis multajn proprajn vortojn, ekzemple, lige al judaj aŭ rusaj esprimoj. Tradukande li provis konservi karkteron de ĉi tiuj vortoj intence, por ne ŝangi koloron de la prozo.



Przemysław Wierzbowski diris, ke "Antaŭprintempo" estas la tria libro esperantigita okaze de Nacia Legado, kiun oni eldonis en Bjalistoko, post "Pupo" de Bolesław Prus kaj "Quo Vadis" de Henryk Sienkiewicz. Li aldonis, ke esperantistoj legis "Antaŭprintempon" dum la Nacia Legado ne nur en Bjalistoko, sed ankaŭ en aliaj polaj urboj kaj Bulgario, Brazilo, Kroatio, Francio kaj Germanio, kie la Esperanto-teksto estis sendita.

Elżbieta Karczewska, gvidantino de la esperantlingva filio de la Podlaŭnia Biblioteko, partoprenis en bela okazintaĵo - la transdono de la esperantlingva "Antaŭprintempo" al la pola diplomataro en aliaj landoj.

Eldono de la esperantlingva tradukaĵo povas inspi eĉ multajn polojn denove, post multaj jaroj, legi la verokon. Ĝis nun "Antaŭprintempo" estas nekonata eksterlande, kaj ni esperu ke dank al Esperanto ĝi atingos multajn landojn kaj legantojn.

En ĉapitro „Literaturaĵoj” redakcio prezentas malgrandan fragmenoton de „Antaŭprintempo”. Ni invitas al legado.

Henryk Borkowski

Mia legado de „Antaŭprintempo”



En la lasta momento antaŭ la organizata en la tuta Pollando Nacia Legado – ĉijare legado de la fama romano de Stefan Żeromski „Przedwiośnie” mi ricevis la informon de Elżbieta Karczewska: „Esperantlingva traduko de la verko jam estas preta. Esperantlingve ĝi estas titolita „Antaŭprintempo”. Ĉu vi volas prezenti ĝin kadre de la Nacia Legado en Łomża?” Mi volonte akceptis tiun proponon, sed mi dubis, ĉu la

organiza komitato de la Nacia Legado en mia urbo akceptos min en la lasta momento. Neatendite, mi estis varme akceptita kaj mi legis fragmenton de „Antaŭprintempo” tuj post la prezidento de mia urbo Mariusz Chrzanowski. Danke al la traduka laboro de Tomasz Chmielik, mi havis la sekvan okazon rememori al loĝantoj de Łomża pri la internacia lingvo Esperanto. Dankon Tomasz!!!



Nova Zamenhof/Esperanto-Objekto en Bjalistoko



Du novaj murpentraĵoj aperis en Bjalistoko. Unu situas ĉe la str. Broniewskiego, la alia ĉe la str. Zwierzyniecka. Sur la unua, kiu situas sur la flanko muro de loĝdomo n-ro 23 ĉe la str. Broniewskiego, ni povas vidi la surskribon en Esperanto "Liberecon por la Mondo". La projekto estis realigita laŭ projekto de Bjalistoka Ludoviko Zamenhof Kulturcentro. La murpentraĵo estis kreita fare de Maciej Szupica de Bjalistoko. Li estas diplo-

miĝinto de la fakultato de Akademio de Belartoj en Gdańsk, kiu kreis pli ol 80 filmetojn kaj reklamajn filmojn, pro kiuj li gajnis multajn premiojn.

Mojose

Rafał Mościński, Małgorzata Sopińska

Nia unua E-aranĝo

Ekde la 5-a ĝis la 7-a de oktobro okazis la 6-a Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo (ĈAR) de PEJ. La evento okazis tre plezuriga kaj interesa.

Vendrede ni veturis al Katowice, por renkontiĝi kun junaj Esperantistoj. Ni alvenis je la 21:00 al la "Hostel Klimczoka 6". Tie atendis nin pli ol 20 partoprenantoj de ĈAR. Tiutage okazis bonveniga renkontiĝo, dum kiu ni povis ekkoni ĉiujn esperantistojn. La organizantoj bonvenigis

nin kaj prezentis la programon de ĈAR kaj poste ni agrable kune interparolis.

Sekvantan tagon parto de la grupo restis en la hostelo por prezenti prelegon pri Esperanto por loĝantoj de Katowice, kiuj volis ekscii ion pri Esperanto kaj E-movado. La dua parto de la grupo kaj ni iris al parko, kie komenciĝis urboludo, preparita de la organizantoj. Ni estis dividitaj en grupojn po tri personoj. Ĉiu grupo ricevis paperfolion kun naŭ lokoj, indikitaj per geografiaj koordinatoj. Ni devis trovi ilin, desegni ĉirkauaĵon, trovi surloke vortojn aŭ frazpartojn - polan kaj alilingvan kaj skribi ilin surpapere. Tio estis tre gaja ludo, dum kiu ni povis ekkoni famajn objektojn de Katowice, ekzemple stadionon Spodek, domon de Nacia Pola Radio-Simfonia Orkestro, Silezian Universitaton aŭ la faman riveron Rawa, kiu trafluas centron de Katowice.

La urboludo finiĝis en manĝejo, kie ni kune tagmanĝis kaj sekve, kun novaj fortoj ni iris rigardi la renomman kvartalon de Katowice - Nikiszowiec. Ni promenis tra la stratoj kaj admiris ministan-laboristan loĝlokon. Poste, ni revenis al hostelo kaj ni solvis la kvizon pri Esperanto, ĝia kulturo kaj E-movado.

Dimanĉe, parto de la grupo adiaŭis nin kaj revenis hejmen. Ni, kun aliaj esperantistoj, rigardis la Muzeon de Silezio. La muzeo estis vere interesa. En la unua parto de la muzeo troviĝas la ekspozicio pri Pola arto el la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Inter aliaj, oni povas rigardi tie pentraĵojn de Aleksander Orłowski, Stanisław Ignacy Witkiewicz kaj Władław Podkowiński. En la muzeo troviĝas ankaŭ interaktiva ekspozicio pri historio de Silezio. Ĝi estas tempvojaĝo tra multaj jarcentoj. La ekspozicio prezentis tre multajn objektojn kaj detalan historion de Silezio. Ni rigardis, kiel aspektis laboro



de la karboministoj antaŭ multaj jaroj, iliajn ilojn kaj vestaĵojn. Ni fervore ekkonis historion de la Silezio kaj urbo de Katowice. Tio estis la lasta planita evento de la renkontiĝo.

La aranĝo tre plaĉas al ni. Ni ekkonis multajn novajn mojosajn E-amikojn kaj certe ni partoprenos la aranĝon venontjare.

Litvo patrujo mia... 1-a parto

Kadre de la Eŭrop-Unia programo ERASMUS la Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz, Pollando organizis komence de septembro 2018 unusemajnan vojaĝon de polaj gejunuloj al Litovio. Ilia celo estis renkonto kun litovaj samaĝuloj, por komune realigi la projekton: „Adam Mickiewicz – la poeto de du landoj”. Kiel la lingvon de komunikado oni elektis Esperanton. Tiun ĉi projekton iniciatis kaj gvidis Halina Komar. La organizajn aferojn en Litovio realigis d-rino Aida Ĉizikaite.

Vilno

De Nowy Sącz ekveturis la buso, lerte ŝoforata de s-ro Mariusz, kun tridek personoj: gelernantoj el la loka liceo, grupeto de mutuloj el la baza lernejo, kaj instruistoj, organizantoj, gastoj, al kiuj ankaŭ apartenis la aŭtoro de tiu ĉi raporto. Vojaĝinte preskaŭ 1000 km, ni atingis Vilnon kaj kuniĝis kun la samnombra grupo de litovaj partoprenatoj de la projekto. Rezulte formiĝis unu teamo, kiu komune serĉis spurojn de Adam Mickiewicz. Tio ne estis rutina turismo, sed aktiva esplorado, kolektado de materialoj kaj notado de impresoj, por rekrei ilin en diversajn formojn: literaturan, poezian, grafikan, fotografikan kaj aliajn. Mi samidee akompanis la gelernantojn kun la celo dokumenti ilian laboron en la filma formo.

La unua paŝo gvidis nin al Adam Mickiewicz. Fakte, al lia monumento. Ĝi estas verko de la litova skulptisto Gediminas Jakubonis. Meandroj de la malfacila loka historio kaŭzis, ke la plej grava urbo de la poeto honoris lin per monumento, digna de lia grandeco, nur en la 1984-a jaro. Flanke de la monumento kuŝas granitaj blokoj kun ĉizitaj reliefoj, prezentantaj scenojn el la dramo de Mickiewicz „La Tago de Mortintoj”. Ili estas parto de la nefinita monumento, kiun oni planis starigi en Vilno antaŭ 1939. La milito pereigis tiun ĉi verkon de la varsovia skulptisto Henryk Kuna.

La monumento al Mickiewicz situas fronte al juveloj de la vilna arkitekturo. La preĝejo al Sankta Anna, starigita fine de la 15-a jarcento, estas mirindaĝo de la malfrua gotika stilo. Oni nomas ĝin la „sungotiko”. La simetrie desegnita fasado, kun krucoj surpinte de la sveltaj turetoj, estas la

majstra verko de Benedikto Rejt. Ĝi ravis Napoleonon, kiu onidire bedaŭris, ke ĝi ne estas ornamaĵo de Parizo. La preĝejo al Sankta Anna konserviĝis en sia origina stato pli ol 500 jarojn. Pli frue estis konstruitaj la gotikstilaj preĝejo kaj monaĥejo de bernardanoj, sed ili laŭtempe estis modifitaj, laŭ la renesanca kaj baroka modoj, respektive en la 17-a kaj la 18-a jarcentoj.



La pola grupo loĝis ĉe la strato de Filaretoj, de kie ni ĉiumatene ĝuis agrablan promenadon al la malnova urbocentro, kie juna Mickiewicz estis unu el la filaretoj. Li estadis en Vilno sep jarojn, kun paŭzoj, kaj sepfoje ŝanĝis sian loĝadreson. En la Sakstrato de Bernardanoj, numero 11, troviĝas Muzeo de Mickiewicz. La poeto loĝis ĉi tie en la jaro 1822 kaj tiam verkis la poemon „Grażyna”. Akceptis nin la mastro de la muzeo - Rimantas Ŝalna kaj prezentis pollingve mallongan prelegon:

La granda merito de Adam Mickiewicz kiel poeto konsistis el tio, ke li estis prekursoro de la romantisma poezio sur la pola tero. Ĉi tie li verkis la poemaron „Baladoj kaj Romancoj”, kiu inspiris per romantisma ideo ne nur polojn, sed ankaŭ litovojn, belorusojn kaj aliajn. Tio okazis en la jaro 1822, en Vilno, kie la kolekto “Baladoj kaj Romancoj” estis eldonita. Kaj kie naskiĝis la pola patriotismo? Ankaŭ en Vilno. Iniciatis ĝin studentoj de la universitato, fakte ilia sekreta organizaĵo de filomatoj kaj filaretoj. Kiam la rusa polico arestis ilin, ekestis problemo de interkompreniĝo, ĉar ili ne konis la rusan lingvon. En Vilno, kie jam regis rusaj okupantoj, la pola lingvo ne estis forigita de la universitato. Tion oni ŝuldis al Adam Czartoryski, kiu estis ministro pri eksteraj rilatoj de la rusa imperio kaj krome kuratoro de la universitato. La pola lingvo estis tiam simbolo de la libereco por poloj kaj litovoj.

Vizito al la aŭtentika ejo, kie la poeto antaŭ 200 jaroj loĝis kaj verkis, estis kortuŝa evento por la partoprenantoj de la pol-litova projekto. La muzeo fondiĝis fine de la 19-a jarcento, kiel privata entrepreno. Nur en 1955-a jaro ĝi iĝis publika institucio, kun pluraj eksponaĵoj, rilatantaj al la privata vivo de la poeto. La ekspozicio „Virinoj en la vivo de Mickiewicz” estas dediĉita ĉefe al Maryla Wereszczak, kiu plurfoje respeguliĝis en liaj poemoj. De la muzeo de Mickiewicz ni iris al la loko plej grava por li, nome la Universitato de Vilno, kie li studis ekde 1815 ĝis 1819. Li tutcerte multfoje vizitis la grandiozan bibliotekon de la universitato. En ĝi konserviĝis senŝanĝe freskoj de Francisko Smuglewicz, pentritaj dum la jaroj 1802-1804. La biblioteko estas nun muzeo kun multaj dokumentoj pri la komuna historio de Pollando kaj Litovio. En la biblioteka legejo ni renkontis litovan partoprenantinon de la projekto, Jogaila, kiu prezentas modelan ekzemplon de la interkultura edukado. Ŝi denaske parolas trilingve: litove kun la patrino, koree kun la patro kaj Esperante en la rondo familia.

La Vilnan Universitaton fondis la reĝo Stefan Batory, en 1570. Modernigis ĝin, en 1773, la Komisiono pri Nacia Edukado. Tiu ĉi institucio de la Pol-Litova regno estis la unua en la mondo eduk-ministerio. La reformo sponis grandan sciencajn progresojn. En tiu altlernejo studis Adam Mickiewicz. La vilna *Alma Mater* forte influis lin, kiel poeton, intelektulon kaj patrioton. Tra la rokoka pordego ni eniris la terenon de la eksa baziliana monaĥejo, kie la rusa polico areste tenis, ekde la oktobro 1823 ĝis aprilo 1824, kvindek filaretojn, alivorte membrojn de la konspira organizaĵo, inkluzive de Adam Mickiewicz, kiu estis ĝia kunfondinto. Filaretoj, akuzitaj pro „disvastigado de la malprudenta pola naciismo”, estis sen formala proceso, ekzilitaj al foraj gubernioj de la granda rusa imperio. Adam

Mickiewicz neniam plu revenis al sia amata urbo.

El la urba defendmuro postrestis trapasejo, kiun litovoj nomas Aŭrora Pordego kaj poloj - Akra Pordego. Super ĝi la ordeno de karmelitanoj konstruis en la 17-a jarcento barokstilan



kapelon kaj solene transportis, el la najbara preĝejo al Sankta Teresa, la bildon de Mizerikorda Patrino, fama pro siaj mirakloj. La bildo, origine renesanca, estis fine de la 18-a jarcento ornamita per la ora robo kun floraj motivoj. Tiam bildon rememoris Adam Mickiewicz, kiam en la epopeo „Sinjoro Tadeo” turnis sin al *Sankta Virgino, kiu en Akra Pordego lumas*. En la urbocentro troviĝas la publika biblioteko je la nomo de Adam Mickiewicz. Tiu ĉi nomo estis atribuita al la librejo okaze de la 100-a mortodatreveno de la poeto. La biblioteko posedas duonan milionon da publikaĵoj, inkluzive de pli ol mil, kiuj traktas pri Mickiewicz, aŭ estas liaj propraj pollingvaj verkoj kaj ĝiaj tradukoj en la litovan kaj aliajn lingvojn.

Ni trovis plurajn spurojn de aliaj famaj polaj vilnanoj: la verkisto Kraszewski, poeto Słowacki, komponisto Moniuszko. Ankaŭ Laŭrenco Gucewicz. Li, kiel kortega arkitekto de la reĝo Stanisław August Poniatowski, konstruis katedralon, la plej belan klasicisman konstruaĵon de la Pol-Litova Respubliko. Gucewicz ricevis kiel taskon renovigi la ekzistantan barokan katedralon, sed li persvadis la episkopon Masalski, ke estus pli ekonomie starigi tute novan templon, dignan, karakterizan por la tiama, klerisma epoko. La malnova katedralo estis malkonstruita, escepte de la kapelo al la sankta Kazimiro, konsiderata perlo de la baroka stilo.



Kazimiro naskiĝis en la 1458-a jaro en Krakovo, kiel filo de la reĝo Kazimiro Jagelono kaj la reĝino Elizabeta, el la imperiestra dinastio de Habsburgoj. La reĝino ĝuis kromnomon „Patrino de Reĝoj”, ĉar du ŝiaj filoj portis kronon de Pol-Litova monarkio kaj du aliaj - de Ĉeĥio kaj Hungario. Kazimiro, jam kiel 13-jara knabo, malsukcese pretendis la tronon de Hungario, kaj, estante formala kronprinco de Pollando kaj Litovio, li mortis en la aĝo de 25 jaroj. La renomo pri lia saĝeco, pieco, modesta

vivmaniero, mizerikorda rilato al malriĉuloj kaj malsanuloj, laste - lia tro frua morto, motivis lian rapidan kanonizon. La grandan parton de sia vivo li pasigis en Krakovo, sed mortis en Litovio, kaj estis sepultita en Vilno. Rezulte de tio, la kronprinco Kazimiro iĝis la unua sanktulo de la litova tero kaj tiu ĉi fakto generis lian grandan kulton en Litovio. Kiam en 1604 oni malfermis lian ĉerkon, montriĝis ke la korpo kaj vestaĵo suferis nenium ŝanĝon. Tion oni konsideris kiel konfirmo de lia sankteco.

Daŭrigo en PE 6-2018

Preterlasita datreveno: 250 000 artikoloj en la Vikipedio en Esperanto

Frumatene, la 18-an de septembro, en la Esperantlingva Vikipedio mi rimarkis artikolon, kiu superis la rekordan nombron 250000. Plej verŝajne ĝi aperis post la noktomezo, sed antaŭ la sunleviĝo, kiu komencas la sekvan tagon.

La Vikipedio en Esperanto, septembre 2018, registris kvaronmilionan artikolon kaj tiamaniere ĝi aliris al la nombro de 16 aliaj, enhavantaj pli ol 250 000 artikolojn. La angla Vikipedio ĉefpaĝe montris ĉi-rilatan statistikon. Ĝi ankaŭ listigas 12 aliajn Vikipediojn kun 1 000 000 da artikoloj, kie la franca kaj la germana superis 2, la sveda 3 kaj la angla 5 milionojn. Ni aldonu, ke la pola atingis 1 300 000 artikolojn, kaj estas la dua laŭ grandeco inter la slavaj Vikipedioj.

La lokon de Esperantlingva Vikipedio oni povas montri fone de aliaj Vikipedioj el la najbaraj landoj. Beloruslingva Vikipedio atingis preskau 160 mil, Litovlingva Vikipedio superis 190 mil kaj Slovaklingva Vikipedio 220 mil artikolojn. Ili tri estas malpli grandaj ol la Esperanta. Sed la Ĉeĥlingva Vikipedio superis 400 mil artikolojn kaj la Ukrainlingva Vikipedio proksimiĝas al 850 mil artikoloj. Laŭvice, Ruslingva Vikipedio antaŭnelonge superis 1 500 000 kaj Germanlingva Vikipedio 2 200 000 artikolojn.

250 000 ARTIKOLOJ!



Esplorante Vikipediojn facilas rimarki, ke eventokalendaro de la germana estas komparebla kun la Esperanta. La Germanlingva Vikipedio listigas eventojn en kelkaj kategorioj: politiko kaj mondaj aferoj, ekonomio, scienco kaj teknologio, kulturo, socio, religio, katastrofoj kaj sporto. Dume, Esperantlingva Vikipedio apartigas eventojn laŭ du kategorioj: la dua

mondmilito en Pollando kaj la mondo, kaj la unua mondmilito. La dua specifaĵo de la E-kalendaro estas ĝuste substreko de la plej gravaj eventoj, ekde la antikva epoko ĝis la kuranta jaro. De tio oni povas preni pli gravajn rondajn datrevenojn, kiuj kutime en diversaj Vikipedioj estas prezentataj ĉefpaĝe, sed ne en la Esperanta. Kaj la tria specifaĵo estas pli detala prezento de konindaj naskiĝintoj kaj mortintoj. Preciza kaj detala kalendaro, rilatanta al la dua mondmilito, troviĝas nur en esperantlingva versio de la Vikipedio. Aliaj enhavas, en la plej bona kazo, nur po kelke da okazintaĵoj ĉiudate.

La kalendaron fermas, post informoj pri eventoj, naskiĝoj kaj mortoj, sekcio pri gravaj tagoj kaj festoj.

Pri kio ni aŭdas

Jean Marc Leclercq

Klimato: Mi ne estas optimista

Jen temo pri kiu ĉiuj parolas kaj samtempe neniu parolas: la tutmonda varmigo, kiu suferigas nian planedon. Tio, kio okazas, estas tre stranga. En la amasinformiloj, oni regule konstatas, ke la situacio pli malboniĝas ĉiun jaron, eĉ ĉiun monaton, (mi dirus eĉ ĉiun tagon), sed neniam parolante pri tio, kion oni devus efike fari. Oni certe ofte anoncas la (tre malfortan) kreskon de la merkato de elektraĵoj, sed nenion pli. Jen la vera problemo.

Oni observas la saman fenomenon pri la drinko de alkoholo antaŭ stirado de aŭto. Dum ĉiu komuna manĝo kun drinkado de alkoholo, la gastoj ĉiam parolas pri la danĝero renkonti policistojn apud la vojo, sed neniam (jes, vere neniam) pri la danĝero okazigi akcidenton. Se antaŭ nelonge unu el viaj amikoj aĉetis aŭton, ĉu vi aŭdis lin paroli pri kvanto de karbona dioksido, kiun ĝi eligas en atmosferon aŭ, plibone, pri la prezo, pri la komforto aŭ pri la aparaturo, kiun ĝi posedas? La tutmonda varmigo eble maltrankviligas ĉiujn, sed neniu ŝajnas esti persone koncernita.

Okazas, ke ekster tre atendataj decidoj de estraroj aŭ de internaciaj instancoj, oni povas siaflanke forte limigi sian manĝon de viando kaj provi uzi biciklon por iri al la laboro ĉiutage, se ne estas pli longe ol 10 km.

Jen nun resumo de mia maltrankvilo: nia socio funkcias dank'al kresko de la homaj aktivecoj.

Tiu kresko de aktiveco kaŭzas la ekonomian kreskon, sen kiu estus recesio (= ekonomia malkresko, kiu kaŭzus senlaborecon kaj malriĉon). Estas do bona afero, sed aliflanke tiuj homaj aktivecoj kaŭzas polvon kaj tutmondan varmigon.

Ni do estas ŝajne antaŭ elekto: ŝanĝi la sistemon aŭ ankoraŭ pli rapidi al la fino de la homa speco. Ĉar fakte temas vere pri tio, oni ofte diras, ke oni devas "savi la planedon", sed la planedo ne riskas ion; laŭ kelkaj sciencistoj, nur la homaro povus malaperi.

La klimatologo de la franca Nacia Centro de Spaca Serĉfako, Robert Vautard, jam diras, ke ni neniam povos reveni al la antaŭa klimato. Jam tio estas neebla. Eĉ se ni sukcesas malkreskigi niajn elĵetojn de CO₂, jam tro malfruas, temperaturo restos alta kaj ĝi plu altiĝas. Altiĝi, tio signifas atingi 50° en meza Eŭropo.

La serpento mordas propran voston: temperaturo altiĝas, do aĉeto de klimatiziloj plimultiĝas. Oni antaŭvidas, laŭ la nacia laboratorio de Berkele, ke en la jaro 2030 funkcios 700 milionoj da aparatoj, do ĉiu nova estos aĉetata je ĉiuj 10 sekundoj (!).

Klimatiziloj uzas "malvarmigajn fluidaĵojn", kiuj estas fakte hidrofliuokarbuoj (angle: *hydrofluorocarbons*, germane:

Fluorkohlenwasserstoffen), de kiuj la varmigpovo estas 1300 fojojn pli forta ol tiu de la CO₂. Jes, vi bone legis: 1300 fojojn. Oni antaŭvidas, ke en la jaro 2040, la bezonoj por klimatiziloj en Ĉinio estos pli altaj ol la nuna tuta elektra konsumo de Japanio.

Mi forgesis la nomon de la sciencisto, kiu diris, ke eligo de CO₂ kaŭzas kreskon de temperaturo, kiu poste kaŭzas kreskon de eligoj de CO₂. Ĉu tio ne nomiĝas senelira cirklo? Kiel oni povas tion haltigi? Tiu sciencisto aldonis, ke okazis la sama afero sur planedo Venuso ("ĝemela" planedo de Tero pro ĝiaj fizikaj proprecoj) ĝis ĝi atingis temperaturon de 400°. Mi neniam tiel forte deziris, ke la sciencisto eraru ...

Certe tio estas nur donitaĵoj, sendube gravaj, sed ne ĉiuj donitaĵoj de la klimata problemo. Povas ĉiam okazi eventoj, kiujn oni ne antaŭvidis ĝis nun, kaj kiuj povus ĉion ŝanĝi.

Sed se ne, ... mi preferas ne pensi pri tio kaj iri trinki kafon.



Granda sukceso de polaj volejbalistoj

En Bulgario kaj Italio, inter la 9-a kaj 30-a de septembro 2018, okazis la 19-a mondĉampionado de la vira volejbalo. Tiu ĉi sportevento okazadas ĉiun kvaran jaron, do lastfoje ĝi okazis en 2014, en Pollando. Tiam venkis la pola nacia teamo, gvidata de la franca trejnisto Stéphane Antiga, post la malfacila finalo kontraŭ Brazilo. Estis do la dua venko de polaj volejbalistoj, post la jaro 1974-a. Pri tio vi jam povis legi en Pola Esperantisto. Post tiu sukceso, kelkaj plej gravaj volejbalistoj rezignis pri la nacia elektitaro, do la nivelo de la pola teamo iome malaltiĝis. Dum olimpikoj kaj eŭropĉampionado, poloj havis nenium sukceson. Oni ne pensis, ke dum la mondĉampionado ili povos gajni iu ajn medalon. Tamen, poloj ludis perfektan turniron kaj ricevis, tute neatendite, la oran medalon. La venko ne estis facila kaj okazis kelkaj malbelaj kaj malsukcesaj matĉoj, sed en la plej gravaj momentoj poloj estis tre fortaj mense.



Pola teamo kun oraj medaloj

La plej grava kaj malfacila matĉo estis la duonfinalo kontraŭ la teamo de Usono. La matĉo estis tre longa kaj emociplena. Poloj venkis 3:2. Poste, kiam antaŭ kvar jaroj, poloj renkontiĝis en la finalo kun brazilanoj kaj gajnis kun ili 3:0. Tiu ĉi matĉo estis pli facila ol la duonfinalo. La plej valora ludanto de la turniro estis elektita polo - Bartosz Kurek, kiu, post kverelo kun la trejnisto S.

Antiga, ne povis partopreni en la ĉampionado 2014. Meritiĝis ankaŭ la trejnisto - belgo Vital Heynen, kiu scipovis perfekte prepari la teamon. Laŭdindas ankaŭ la kapitano de la teamo - Michał Kubiak, kiu bonege plenumis sian taskon.

La pola nacia teamo de volejbalistoj estas unusola en Pollando, kiu jam trifoje ricevis la titolon de mondaĉampiono.



Trejnistoj Vital Heynen kaj la plej valora ludanto Bartosz Kurek

Vizitindaj lokoj


Robert Kamiński

Centro de Scienco EC1 en Łódź

Unu el la gravaj arkitekturaj objektoj en la urbocentro de Łódź estas la komplekso de konstruaĵoj post la malnova elektrocentro, kie nuntempe agas la kultura institucio, administrata de la urbo Łódź kaj la Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo - "EC1 Łódź - Urbo de Kulturo".

La revivigita kaj pligrandigita EC1-komplekso havas kulturajn, artajn kaj edukajn funkciojn. Samtempe ĝi estas grava elemento de la Nova Centro de Łódź, kunplektante arkitekturajn tendencojn de la komenco de la

pasinta jarcento kaj de la moderna, post-industria epoko. Laŭ la fonda koncepto, EC1 estas la spaco, malfermita por artistoj de diversaj kampoj kaj adaptita por individua kreemo, atelieroj kaj gruparanĝoj, kun la necesa ekipaĵo. EC1 ofertas eventojn, kiuj ebligas pasigi liberan tempon saĝe kaj interese.



La 8-an de januaro 2016, en la konstruaĵo EC1-Oriento, estis malfermita planetario - la plej moderna en Pollando kaj unu el la plej modernaj de Eŭropo. Ĉiujare ĝi estas vizitata de preskaŭ 150,000 da spektantoj. Valoras mencii, ke la Planetario EC1 atingis la unuan lokon en la konkurso "7 Novaj Mirindaĵoj en Pollando 2016", organizita de la revuo National Geographic Traveler.

En la okcidenta parto de la komplekso EC1, estas lokita la plej granda en Pollando Centro de Scienco kaj Teknologio kun sferoidforma kinejo 3D.

Dank' al tio, ke konservitaj partoj de la malnovaj instalaĵoj kaj ekipaĵo de la malnova objekto estas kombinitaj kun modernaj formoj de prezentado, oni ricevas unikan ŝancon por akiri scion, inter alie, pri transformigado de energio

Centro de Scienco kaj Teknologio EC1 invitas ĝui tri edukajn vojojn: energia vojo, vojo de la historio de civilizacio kaj scienco, vojo "Mikromondo - Makromondo" kaj viziti ankaŭ potempajn ekspoziciojn.

La unua el la proponitaj edukaj vojoj "transormado de energio" estas bazita sur la historia instalaĵo de la objekto kaj temas pri la problemo de la elektro-produktado. La aliaj du vojoj, "Disvolviĝo de scio kaj civilizo" kaj "Mikromondo - Makromondo" prezentas elektitajn konceptojn, leĝojn, fizikajn kaj kemiajn fenomenojn, dank al kiuj aperis vivo sur la tero.

La Scienca kaj Teknologia Centro EC1 proponas kunlaboron kun vizitantoj. Laboratoriaj eksperimentoj estas devigaj elementoj de edukado pri kemio kaj fiziko, dum ĉiuj etapoj de la instrua procezo.

En la orienta parto de la kompleksa EC1, troviĝas sidejo de la Nacia Centro pri Filma Kulturo, kiu estis fondita meze de 2015 kaj inaŭguris sian agadon komence de 2016. Ĝi estos la ĉefa en Pollando kaj unika en nia parto de Eŭropo kultura kaj eduka centro pri filmo kaj kinoarto. Ĝi estos ekipita per tri ekranoj, interaga ekspozicio, dediĉita al la historio kaj estonteco de filmaj teknologioj, kaj pedagogia vojo pri historio de la pola kinoarto. Ĝi fariĝas unu el la plej gravaj centroj de la kultura vivo en la urbo kaj en nia lando.



La sekva parto de "EC1" estas Łódź Film Commission (ŁFC), kiu proponas vastan helpon al filmistoj: ek de serĉado de lokoj por krei filmojn ĝis akirado de necesaj permesoj por realigado de filmaj projektoj. "EC1 Łódź" i.a. estas kunproduktanto de la plej lasta filmo de Andrzej Wajda "Powidoki", biografia filmo de Marie Noelle "Maria Skłodowska-Curie" aŭ la Oscar-gajninta filmo de Urszula Antoniak "Między słowami". Krom

rakontfilmoj, ŁFC kunfinancas ankaŭ dokumentajn filmojn kaj filmverkojn por infanoj.

La lasta sekcio de "EC1" en Łódź estas la Centro de Komikso kaj Interaktiva Rakontado, kies laborantoj organizas la faman Internacian Festivalon de Komiksoj kaj Komputilaj Ludoj. La ideo de ĉi tiu centro estas konatigi vizitantojn kun la komiksa arto kaj kun interaga rakonto. Gastoj de la prezentataj tie ekspozicioj ekkonas la tutan kread- kaj eldonciklon de la komikso - de la elekto de grafika formo, tra la kreado de rakontotabulo (storboard) kaj plenigado de la tabulo per enhavo, ĝis la kolorigado. Ĉiu povas fini la vizitadon kun memfarita verko en sia mano.

"EC1 Łódź - Urbo de Kulturo" estas la loko por saĝa pasigo de tempo. Kulturo najbaras tie kun scio kaj scienco tiel, kiel historio interplektiĝas kun moderneco.

Homoj

Małgorzata Komarnicka

Hilary Koprowski – la belanima sciencisto

Laste mi rigardis en la pola televido belan filmon pri la profesoro Hilary Koprowski, pola-usona virusologo, imunologo kaj inventinto de la unua polio-vakcino. Li estis la unua, kiu testis la buŝan vakcinadon kaj donis al Albert Sabin specimenojn de mildigitaj virusoj.

Li naskiĝis la 5-an de decembro 1916, en Varsovio. Li studis medicinon kaj muzikon, akirante diplomojn pri medicino de la Varsovia Universitato kaj pri muziko de la Muzika Konservatorio en Varsovio kaj la Muzik-Akademio en Romo.

Antaŭ la dua mondmilito, li kun sia familio fuĝis al Brazilo, kie li esploris malkovron de vakcino kontraŭ la flava febro. Post la milito, li translokiĝis al Usono. Tie Koprowski eklaboris pri la trabuŝa vakcino kontraŭ polio. Ĝi, en la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento, estis testita kun sukceso en Afriko. Bedaŭrinde, kiam aperis aidoso, la profesoron oni akuzis, asertante ke tiu testado elvokis tiun strangan malsanon. Feliĉe, genetikaj esploroj pruvis, ke la profesoro fariĝis viktimo de falsaj akuzoj.

La profesoro, en la jaro 1959, organizis kampanjon, dank'al kiu en Pollando infanoj ricevis vakcinojn kaj tial rapide la nombro de malsaniĝoj je poliomjelito malkreskiĝis.



Profesoro Hilary Koprowski ricevis multajn sciencajn titolojn de polaj universitatoj. Li estis eksterlanda ano de la Pola Scienca Akademio, honora doktoro de la Medicina Akademio en Poznań kaj en Varsovio kaj ekde la jaro 2007 li fariĝis *Honora Civitano de Varsovio* kaj ankaŭ laŭreato de la konkurso *Eminente Polo*. En la jaro 1998, Hilary

Koprowski estis distingita per la plej alta ŝtata ordeno, la *Komandora Kruco kun la Stelo de Ordeno de Renaskiĝo de Pollando Polonia Restituta*. En la jaro 2007 li ricevis la sekvan ŝtatan gravan ordenon: la *Granda Kruco de la Ordeno de Renaskiĝo de Pollando*. Tamen mi pensas, ke por li la plej grava distingo estis *Ordeno de la Infan-rideto*. Ĝi estas tre prestiĝa, ĉar donacas ĝin polaj infanoj.

Mi rekomendas la belan, autobiografian libron: “Wygrać każdy dzień” (Gajni ĉiun tagon), kiun la profesoro skribis kune kun la fama pola verkistino kaj ĵurnalistino Agata Tuszynska.

Domaĝe, ke tiel malmulte oni scias pri tiu ĉi granda homo. Mia kolego, kuracisto, kiun mi demandis pri la profesoro Hilary Koprowski, respondis, ke „efektive, dum mia studado de medicino mi neniam aŭdis pri Hilary Koprowski, mi mem trovis informojn pri li.”

Profesoro Hilary Koprowski mortis la 11-an de aprilo 2013, en Filadelfio. Li estis homo de nekutima vivpasio, li estis kuracisto, sciencisto, poligloto, intelektulo, konanto de la monda beletristiko, kaj ankaŭ diplomita muzikisto, kiu publike koncertis. Malgraŭ tio, ke li pasigis plimulto de sia vivo for de Pollando, la lando de sia infanĝo, li sentis kun ĝi nedisigeblan ligon, kiun li arde subtenis.

La menciita libro proksimigas bildon de la antaŭmilita Varsovio, konvinkas pri la grava rolo de kulturo en nia vivo kaj ĝi estas ne nur rememoro pri la belanima homo, interparoloj kun liaj familianoj, kolegoj kaj kunlaborantoj, sed ankaŭ ĝi montras mankon de la homa lojaleco, neglektadon de aliuloj kaj flatadon de mezbonuloj al homoj, kiuj havas iu ajn povon super aliaj.

Mi lasas vin kun kelkaj frazoj de la profesoro Koprowski: “Nelojaleco estas kruelega eco, sed lojalecon estas malfacile trovi inter homoj. La lojaleco en nia familia kodo estis ege grava. Nun estas alie. La homoj pli multe ŝatas venĝi ol pardoni. Ili estas furioze avidaj. Ne temas pri tio, kion oni faras, gravas esti la unua, venki aliajn, triumfi. Mi observas tion en la scienca medio.”

[la foto:

https://www.google.pl/imgres?imgurl=https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/thumb/a/a9/2007.09.16._Hilary_Koprowski_b_Kubik_01.JPG/220px-2007.09.16._Hilary_Koprowski_b_Kubik_01.JPG&imgrefurl=

Adamo Zqbek

Johano Kawka el Tychy

Jan Kawka (Johano Kafeto, Monedo) naskiĝis la 5-an de oktobro 1930 en Będzin. Esperantiĝis en la jaro 1984 dum la kurso organizita en la Kulturdomo „Tęcza” en Tychy. Li estis aktiva fervora esperantisto, partoprenis en multaj aranĝoj en Pollando kaj eksterlande. Dum multaj jaroj estis membro de la Pasporta Servo. Dum dek jaroj estis prezidanto de la Klubo “Esperanto” en Tychy.

Forpasis la 30-an de aŭgusto 2018 en Tychy. Ni adiaŭas nian amikon Johanon kun profunda malĝojo kaj bedaŭro.

Li restu en Paco.



La – specialaj uzoj – 1-a parto

La anstataŭ poseda pronomo

Ofte oni uzas *la* anstataŭ poseda pronomo, se la kunteksto klare montras, kiu la posedanto estas. Tio aparte ofte okazas, kiam oni parolas pri korpopartoj, vestaĵoj aŭ parencoj. Tiam oni tre ofte preferas *la*:

- *Li levis **la kapon**.* = *Li levis sian kapon.*
- *Mi montris per **la fingro**, kien li iru.* = *...per mia fingro...*
- *Ŝi lavis al si **la piedojn**.* = *Ŝi lavis siajn piedojn.*
- *La vojkamarado balancis **la kapon** kaj estis tre malĝoja.*FA1.73 = *...balancis sian kapon...*
- *La randon de **la ĉapelo** li ofte ektuŝas per **la mano**.*M.167 = *...de sia ĉapelo ... per sia mano.*
- *Kien vi volas iri, ke vi metis sur vin **la festan surtuton**?*FA3.96 = *...vian festan surtuton?*
- *Diru al **la patro**, ke mi estas diligenta.*FE.8 *La patro* = *mia patro* (la patro de la parolanto). Oni tamen ofte uzas la vortojn *Patro* kaj *Patrino* (kun komenca majusklo) kvazaŭ proprajn nomojn sen *la*. Tiel oni ofte parolas ene de familio. Se la parolanto kaj la aŭskultanto estus samfamilianoj, la frazo do povus esti: *Diru al Patro, ke mi estas diligenta*. La karesformojn *paĉjo* kaj *panjo* oni ĉiam uzas propranomece sen *la*, kiam oni parolas pri la propraj gepatroj: *Diru al Paĉjo/paĉjo, ke...*

La anstataŭ ĉiuj

Kiam ne estas risko pri miskompreno, oni povas uzi *la* anstataŭ ĉiuj, sed *la* ne estas same insista kiel ĉiuj:

- *La gastoj eksidis ĉe la tablo.* ≈ *Ĉiuj gastoj eksidis...* Ĉiuj insistas pri tio, ke neniu gasto mankis. Kun *la* povus esti, ke eble mankis iu, sed tion oni opinias malgrava.
- *Ĉi-vespere la Angloj prezentos teatraĵon en la kongresejo.* *La Angloj* ≈ *ĉiuj Angloj*. La situacio (kongreso) tamen limigas la sencon de *ĉiuj Angloj*. Temas pri (pli-malpli) ĉiuj Angloj, kiuj partoprenas en la kongreso, kaj ne pri ĉiuj Angloj de la mondo. Alia interpreto estas, ke temas pri grupo, kiu kvazaŭ reprezentas ĉiujn Anglojn en la kongreso.

Ofte, kiam oni parolas ĝenerale pri speco, *la* egalas pli-malpli al *ĉiu* aŭ *ĉiuj*.

La antaŭ lingvonomoj

La estas uzata antaŭ lingvonomoj, kiuj konsistas el A-vorto plus la vorto *lingvo* (ofte subkomprenata). Oni uzas *la*, ĉar oni rigardas la lingvojn kiel unikaĵojn: *la Angla (lingvo)*, *la Ĉina (lingvo)*, *la Nederlanda (lingvo)* k.a. Ekzistas nur unu Angla lingvo, nur unu Ĉina k.t.p. (Efektive ekzistas ofte pluraj variantoj de tiuj lingvoj, sed normale oni ignoras tion.)

Oni tamen ne uzu *la* ĉe tiuj malmultaj lingvoj, kiuj havas propran O-vortan nomon, ekz. *Esperanto*, *Latino*, *Sanskrito*, *Ido*, *Volapuko* k.a.

La antaŭ plej kaj malplej

Kiam *plej* aŭ *malplej* ĉeestas, temas normale pri io unika, kaj sekve oni uzas *la*:

- *La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro.*FE.21

- *Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredoblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas.*FE.41

- *El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna [infano].*FE.10

- *Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj [homoj], kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.*FE.32

Se temas pri komparo inter du individuaĵoj aŭ du grupoj, oni uzas kutime *la (mal)pli* anstataŭ *la (mal)plej*:

- *Unu vidvino havis du filinojn. La pli maljuna [filino] estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrino.*



Stefan Żeromski

Tradukis: Tomasz Chmielik

Antaŭprintempo

Al sinjoro Konrad Czarnecki¹ amike donacas ĉi verkon
La aŭtoro

...”Dum multaj tagoj Cezary Baryka vidis en la amaso da mizeruloj kaj almuzuloj iun viron, kiu ĉiam teniĝis proksime al li. Estis rusa kampulo, barba kaj vila, en nekredeble malpurega *rubasĥko* kaj *armjako* ŝirita ĝis la lasta fadeno. Surkape li havis ĉapon kun viziero kaj bast-ŝuojn sur la plandoj, kiuj elŝoviĝis el la tuboj de krudtola pantalono. Li aperadis plej frue en mateno kaj dormetis sur amaso da grandaj ŝtonoj, kiujn oni elprenis dum la fosado de la tombego. Ĉiam li mallevis la kapon en ambaŭ polmojn, fermetis la okulojn kaj kaŝis sub la viziero de la ĉapo, deŝovita sur la frunton, kaj havis klinitan dorson. Neniu el la vigla kaj vaga bando da manĝaviduloj turnis al li sian atenton. Tamen Cezary gardis sin. Komence li pensis pri verŝajna atako aŭ ruzaĵo. Poste li ŝanĝis la opinion, ĉar la observado konfirmis, ke tiu nekonata sidanto apartenas al la speco de frenezetaj *jurodivoj*. La ulo ne baraktadis - same kiel ĉiuj aliaj - pri manĝaĵo kaj trinkaĵo, kaj sidante sur la monteto da ŝtonegoj li senĉese kantetis ion subnaze. Ĉiuj frenezaj homoj vekas scivolon ĉe la homoj kun sana psiko, do ankaŭ li ekinteresis la junan Barykan.

Kiu li estas? Kial li sidadas ĝuste ĉi tie, kaj ne en alia loko? Kion li kantetas subnaze - kaj al kiu? Dum la ripozo-momentoj la juna fosanto komencis aŭskulti. Li orekaptis monotonan, unuforman sonon, kiu Ĉiam denove tremtemis kortuŝe kaj ekstaze. Li aŭskultis la sonon en la sama agoparto je la dua kaj la tria horoj. Ĝi estis sama. Kaj ĝuste estis du silaboj, plilongigitaj kaj ripetataj ĉiam en la sama maniero. Estis io stranga, neordinara, incita. Kiam la murmurego de la fosantoj kaj la bruo de ilia komuna penado silentiĝis, Cezary aŭskultis la kanton de la frenezulo, en kiu sonis kvazaŭ lia karesnomo:

- Czarus - Czarus - Czarus...

¹ Konrad Czarnecki Pentristo kaj diplomato, kiel ataŝeo de la pola legacio en Stokholmo (1919-1924) li fervore subtenis la kandidatigon de Stefan Żeromskial la Nobelpremiopri literaturo (kiun ricevis tamen Władysław Stanisław Remont)



ANTAŬ
PRIN
TEMPO

Ni rigardis la naskiĝon de nova regado. Finfine la maljustecon for! For la perforton de homo kontraŭ homo! Via filo ne povas stari en la vico de la subpremantoj! Mi ne volas!

Ne povante klarigi al si tiel mirigan similecon inter la kanto de la nekonato kaj sia iama karesnomo, Cezary fine proksimiĝis al la palisaro, kies fostoj - trafitaj de turkaj obusoj - restis ankoraŭ kelkloke kaj klinis sin teren. Li apogis la bruston al unu el tiuj fostoj kaj atente rigardis la almozulon. Tiu ĉesis kanti kaj levis sian kapon. Tiumomente, kiel oni diras, la tuta sango fluis en la koron de Cezary. Li ekvidis paliĝintajn, blujajn okulojn, kroĉitajn al liaj okuloj - la okulojn, en kiuj speguliĝis la serena ĉielo. Mirego, dubo, necerteco, teruro, ĝojo, feliĉo, frenezo pro raviĝo - ĉio ĉi tio enfermis sin en unu flustra vorto:

- Patro!

La mizerulo, sidanta sur la monteto da ŝtonegoj, skuis la kapon tiel, kvazaŭ li ne konsentus la rekonon kaj konfirmon de la feliĉo de ĉi tiu vero. Denove li mallevis la vizaĝon al la brusto kaj kaŝis sub la viziero de la ĉapo siajn blujajn okulojn. Cezary restis surloke kaj konvulsie alpremegis sin al la barilo. Li ĉirkaŭprenis la foston por certigi sin, ke li ne dormas, ke li vidas ĉi homon reale. Liaj piedoj tremegis. Li volis salti tien. Li sufokis krion en la brusto. Ekhezitis. Teruriĝis. Ĉu estas nur ia simileco de la okuloj? Ho, ne! Ne! Kial ĉi tiu homo estus delonge kantanta lian nomon? Ja li ekkantis ĝin denove:

- Czarúš - Czarúš - Czarúš...

Ĉiela rideto, la rideto de homo, kiu vere troviĝis malproksime de la tero, flirtis sur lia buŝo, ne kovrita per ombro kaj lumigita per la suna brilo. Estis la buŝo de lia patro. Estis li en la ĉifonvesto de tiu alvagingto. Cezary ankoraŭ restis surloke, kvazaŭ enradikiĝinte, kiam la ĉifonulo peze levigis de la ŝtonegoj kaj kun peno trenis la piedojn, zumante sian kanteton, al la malplej agrabla loko - latrino el tabuloj, staranta inter la fosego kun kadavroj kaj la soldatejo.

Estis la komuna necesejo por soldatoj, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj enfosas la kadavrojn. La latrino antaŭ la kavoj da fekaĵo, ankoraŭ ne superŝutitaj per tero, havis tabul-barilon, kiu la interesajn aferojn apartigis de la homaj rigardoj. La *bradjago*², en kiu Cezary rekonis sian patron, malaperis post la tabul-barilo. Tamen antaŭ ol malaperis, li turniĝis al Cezary kaj per nerimarkebla kaposkuo alvokis lin ĝuste tien. Cezary reiris al sia laborloko, ankoraŭ momenton li fosis kun granda fervoro, kaj poste li ĵetis la fosilon surteren kaj rapide ekiris al la latrino. Kiam li haltis malantaŭ la tabul-barilo, tuj ĉirkaŭprenis lin forte la patraj brakoj.

Nun estis nenia dubo! Estis la patraj manoj, lipoj brusto! La kapo de la junulo falis kun laŭta suspiro de senvorta feliĉo, kun krio de ĝoja ebrio sur la bruston de la patro. Kaj li ĉirkaŭbrakis la filon En la densa aero de la latrino kiu sufokis - kaj kun alia odoraĉo - la fetoro de la putrantaj kadavroj, kiun alblovigis ĉi tien la kirlovento - ili travivis la sanktan momenton de retroviĝo, ĉirkaŭpreno, la unuan momenton de la renkontiĝo sur tiu ĉi tero. Sensona krio de feliĉo elŝiriĝis el ilia brusto. Batadis en ili unu koro kaj unu sango fluis en iliaj vejnoj. Kiam aŭdiĝis paŝoj de iu venanto, la filo kaj la patro forsaltis en la kontraŭajn angulojn de la latrino kaj ŝajnigante pisadon en du malproksimajn kavojn, ili impresis kiel homoj, kiuj nenion

2 *bradjago* (en la rusa: vagabondo)

scias unu pri la alia. Kiam tiu foriris al sia laboro, ili okupis la antaŭajn lokojn.

- Kial ni ne povas malkaŝe esti kune? - demandis Cezary.
- Mi timas! Tataroj konis min ĉi tie. Ĉiuj min konis. Iu povus denunci venĝe. Mi estus tuj mortigita. Kaj mi ne volas nun morti!

- Pro kio ili mortigu vin?
- Oni ja ne scias, pro kio homoj mortigas nun homojn!
- Panjo ne vivas! - konfesis Cezary.
- Mi scias.
- Ĉu vi iris al ŝia tombo?
- Jes.
- Kiel vi eksciis, en kiu loko ŝi kuŝas?
- De tiu kartvelo, de la pastro.
- Kiel vi trovis min?
- Mi trovis... - kun mallaŭta rido diris Sewern Baryka.

Liajn okulojn briligis pezaj larmoj, kiuj unufoje de multaj jaroj malbridis nun afliktojn en lia animo. Li ekĝemis, sensone ploregis sur la brusto de la filo. La junulo ĉirkaŭprenis lin. Subtenis kaj glatumis la dorson per siaj tremegantaj manoj.

- Kie ni renkontiĝos? - demandis Cezary rapide.
- Nokte mi venos ĉi tien. Mi atendos vin sur la monteto da ŝtonegoj kiel ĉiam.

- La gardistoj staras nokte ĉirkaŭ la soldatejo.
- Mi scias, en kiu loko staras la gardistoj. Multajn noktojn mi jam pasigis ĉi tie en atendado, ĉar mi esperis, ke vi povus hazarde eliri.

Postnoktomeze mi eliros.

- Ni iros al panjo. Tra la kampoj tie.
- Kaj de kie vi venas?
- Cezary Baryka svingis la manon duonronde en la direkto al la norda horizonto.

- Sed de kie? - demandis la filo.

- El la mondo.

- Nu, de kie?

- El Rusujo.

- Oni diris al mi, ke vi pereis.

Post momento Cezary ekhurlis ĝoje, kiel hundo.

- Vi ne pereis! Vi ne falis morta dum batalo! Ho, kia feliĉo!

- Ankaŭ vi ne pereis!

- Kie vi estis tiom longe? Kie vi estis, paĉjo?

- En la legioj - malproksime, tre malproksime - en Polujo.
- Panjo atendis... - elflustris la filo.

Ne povante paroli, Sewern denove svingis la manon vastronde tra la duona horizonto. Li elbalbutis ion, kio estis apenaŭ komprenebla:

- Jam nun... Jam tempos... For de ĉi tie! Ĉu vi volas?
- Ah, mi volas? Sed kune kun vi!
- Jes! Kun mi!
- Nu!

Ankoraŭfoje ili ĉirkaŭprenis unu la alian, ankoraŭfoje per la feraj brakoj. Denove venis iu. Cezary reiris pezapaŝe al sia fosilo.

Post la haltigo de la terura buĉado kaj rabado, la turka regado en Baku, kiun ĝenerale distingis prudento kaj bonvolemo, ne daŭris longe. La Versajla traktato devigis la turkojn retiriĝi el Baku kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kio ebligis certan sendependecon ĉe la bordo de la Kaspia maro, kiu estis nomita Azerbajĝano. Sed ankaŭ tiu nova ŝtato, kaj pli ĝuste ŝtateto ne povis vivi tro longe. Detruis ĝin la invado de bolŝevistaj trupoj, kiuj malbridis kun siaj revoluciaj sloganoj novajn buĉadojn, punojn, ekzekutojn, perfortadon, ne malpli kruelegajn kaj terurajn ol antaŭe.

Tiutempe, en malfrua aŭtuno, antaŭ ol la sovetiaj trupoj komencis sian marŝon al sudo, Sewern kaj Cezary Baryka decidis forlasi Bakuon.

Post kiam retiriĝis la turkoj, ili ekloĝis kune, kaj pli ĝuste mizerumadis, sed pretigis sin por la forveturo. Sewern adiaŭis la edzinon, kaj Cezary -sian patrinon, enterigitan sur la tombejo. Ili kolektis monon, penigante sin per ia ajn laboro kaj ĉie, kie ili nur trovis okupon. Sed Cezary ankoraŭ ne sciis kiel perlabori, kaj Sewern ne povis, ĉar mankis al li fortoj. Li estis tre elĉerpita per la milito, fizike detruita. Sur la korpo li havis multajn vundojn kaj difektitan kranion sur la kapopinto. Tiu lasta vundo precipe suferigis lin kaj malhelpis labori korpe kaj mense.

Kun granda peno ili pretigis sin. Ili jam havis botojn, pantalonojn, jakojn kaj ĉapojn, sed mankis io pli grava, kio por la homo, kiu eligis sin el la fundo de la barbareco, estas nepre necesa samkiel ĉemizo kaj ŝuoj. Ili ne

havis monon por aĉeti kuracilojn al la patro, ĉar ili devis ŝpari ĉiun groŝon por veturbiletoj. Sewern deziris trovi sian valizon kaj rakontis al la filo miraklajn historiojn pri ĝi."....



ANTAŬPRINTEMPO

Fragmento - paĝo 48 - 50

Kiel aĉeti feliĉon



Esploroj kontraŭas la aserton, ke mono ne donas feliĉon. Pli altaj enspezoj kaŭzas, ke ni sentas nin pli feliĉaj en la vivo. La Gallup-Instituto faris eksperimenton. Al homoj el la tuta mondo oni ordonis imagi eskalon de kontento, kies pinto estas simbolo de la plej bona vivo. Sekve, oni demandis la respondantojn, sur kiu ŝtupo ili staras kaj kiom ili perlaboras. Homoj el diversaj landoj respondis simile. Kune kun ilia enspezokresko kreskis la kontento pro la vivo kaj sensignifa estis la konkreta valoro de iliaj enspezoj. Sensignife estis, ĉu la salajro kreskis el 1 ĝis 2 mil, aŭ el 10 ĝis 20 mil. En ambaŭ kazoj, la kontento estis la sama. El tio sekvas, ke la malplej riĉaj devus senti sin la plej malfeliĉaj. Tamen montriĝis, ke en la grupo de la plej malbone salajritaj (malpli ol dek mil dolaroj jare), ĉiu tria homo difinis sin per la nomo „tre feliĉa”. Laŭvice, en la grupo de la plej riĉaj (kun pli ol duonmiliono da dolaroj jare), ne tro feliĉaj estis eĉ 27 procentoj.

Interesan klarigon de la fenomeno donas la libro de du sociologoj – Elizabeth Dunn kaj Michael Norton, titolita „La feliĉa mono: La arto de pli saĝa elspezo”. Ilia teorio diras, ke oni povas aĉeti_feliĉon, sed ne ĉiu scias, kiamaniere oni faru tion.

Vi vekiĝas matene kun miliono sub la kuseno. Kiel vi elspezos la monsumon? Vi aĉetos domon? Aŭtomobilon? Se vi estas silmila al multaj homoj en la mondo, vi certe klopodos kontentigi viajn kapricojn. La arto de la mono elvokas egoismajn sentojn kaj provokas al aĉetado de objektoj. Sed t.n. firmaj bonhavo donas nur pormomentan feliĉon.

Usonaj esploristoj montris, ke la posedantoj de domoj ne estas pli feliĉaj ol loĝejdungantoj kaj eĉ translokiĝo el la malvasta ĉambreto al la ampleksa loĝejo havas surprize malgrandan influon je la feliĉnivelo.

Germanaj sciencistoj esploris milojn da civitanoj de tiu lando, kiuj ŝanĝis domojn je pli komfortaj. Dum la daŭro de 5 jaroj, ekde ilia transloĝiĝo, oni notis kreskon pri la kontento pro la loĝkomforto, sed ne pro la vivo kiel tia. Kiel do aĉeti feliĉon?

La homo feliĉiĝas aĉetante spertojn, ne materialaĵojn, kaj konsumante ilin inter aliaj homoj, plej bone inter geamikoj. Ekskurso, koncerto, komuna manĝo...

Gustumado de sentoj igas nin tiaj, kiaj ni estas, kaj kundivido de travivaĵoj igas nian vivon pli feliĉa. La signifon havas tio, kiamaniere ni elprofitas monon, ne tio, kiom multe ni posedas. Ĉu ne estas tiel, ke feliĉigi nin povas kutima kafo, eltrinkita kun amiko, kaj samtempa agrabla interparolo?

Poŝtkesto



Aleksander Zdechlik

Kongreso aŭ nekongreso

Respondante al artikolo de Irek Bobrzak kiu aperis en Pola Esperantisto n-ro 3/2018 mi povas nur rimarki, ke dilemon kiun li havis, havas ankaŭ aliaj personoj ankaŭ mi. Mia unua kongreso UK-o en Tampere en Finnlando kaŭzis, ke mi havis similan dilemon. Por mi la UK-o estis nur amika renkontiĝo. Neniu volis serioze trakti problemojn pri la internacia lingvo kaj pri Esperantomovado. UEA okupiĝis nur pri si mem. Multaj personoj traktis la aranĝon nur kiel turisman aŭ artan eventon. Eble nur pli fruaj UK-oj estis veraj kongresoj.

Intertempe mi partoprenis en multaj aliaj kongresoj kaj rimarkoj estis similaj. Polaj kongresoj ne estis esceptaj. Konkludo estas jena: kongresoj ne estas kongresoj. Sed mi al kutimiĝis al tio, tiel forte, ke mi persone jam pri la dilemo forgesis.

Estas jam jaro 2018 kaj danke al Irek Bobrzak revenis la dilemo. Kion nun mi povas diri pri la temo, ĉar fakte nenio ŝanĝiĝis. Nomi iun Esperantan aranĝon kongreso, estas fakte praktika artifiko, ĉar trovi sponsorojn, financojn estas ĉiam pli facile, kiam gravuloj ekscias pri organizota kongreso. Se organizantoj informus la gravulojn pri organizota Esperanta renkontiĝo, ilia intereso povus esti minimuma. Reago de Irek Bobrzak ankaŭ devos esti pripensita de organizantoj. Se novuloj sentas sin iom trompitaj, pro neĝusta nomo de iu aranĝo, ni ne pensu, ke ĉio estas en ordo.

Post iom da tempo hodiaŭaj novuloj devos depreni de ni la taskon gvidi la movadon. Se ili sentas sin bone inter ni ankaŭ pro tio, ke neniu trompis ilin, la ŝanĝo de postenoj estos pli facile farebla.

Ĝis nun estas jam decidite, ke en la jaroj 2019 kaj 2020 gravaj du aranĝoj, organizotaj de PEA, estas nomitaj kongresoj, sed en la jaro 2021, ĉio estas ebla.

Kaj, se Irek Bobrzak havas alian ideon, bonvolu kunorganizi la aranĝon kun PEA. Venontjare estos balotoj en PEA kaj estos okazo, ke li eĉ povos kandidatiĝi al Ĉefa Estraro de PEA. Mi deziras al li sukceson. Mi persone ne kandidatiĝos kaj, pro tio, miaj deziroj estas vere sinceraj.

Do, kara amiko antaŭen!



Adam Wilkus,

Eksterordinara astronomia evento antaŭ UK

Unu tago antaŭ la 103-a Universala Kongreso en Lisbono okazis eksterordinara, tre malofta, astronomia fenomeno: plena eklipso de la luno, kiun mi hazarde vidis en Porto, foririnte vespere al teraso. Luno unue estis plenronda kaj poste preskaŭ tute malaperis dum pli ol unu horo antaŭ ĝia reapero. Venontfoje tia fenomeno okazos en la jaro 2123 j. do post 105 jaroj!



Kalendaro

2-4.08. 2017	Esperanta stando dum PolandRock Festival - en Kostrzyn, ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo	Centro de Interkultura Edukado Halina Komar halinakomar@gmail.com
1-9.09. 2018	51-a Internacia Esperanta Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, pomer@wp.pl
7-9.09. 2018	Esperanto sur la Strando - 2018 Gdynia – Sopot. Temo: „Nia m/s „Zamenhof”	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/ FB – esperantowsopocie.pl
21-23.09. 2018	34-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2018” en Poznań	E-SESCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. http://www.arkones.org/eo/
13-14. 10.2018	42-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
14.10.2018	Patriota kanto laborejo en pola kaj Esperanto en L. Zamenhof-centro en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
9-11.11. 2018	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 22 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
14-16.12. 2018	19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
28.12- 4.01 2019	10-a JES Junulara Esperanta Semajno en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino.	Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl , http://jes.pej.pl/2016/
11-13. 10.2019	43-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl

Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

27.12-3.01.2019	17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden, Germanio	EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 10551 Berlin. - retadreso: lu.esperanto@gmx.de
27.12-3.01.2019	Luminesk' - en Königswinter apud Bonn, Germanio	Andreas Diemel, Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg, Germanio. - retadreso: andreas.diemel@web.de
3-7.01.2019	Poludnica 2019, 37-a Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj en vilaĝo Liptovský Ján (Malaltaj Tatroj, Liptov-regiono), Slovakio	Liptova Esperanto-klubo, Školská ul. 4, 031 01 Liptovský Mikuláš, poludnica83@gmail.com www.poludnica.esperanto.sk
1-9.05.2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso volodomir@ukr.net. http://aromajalto.ukrainio.org.ua/
7-10.06.2019	96-a Germana Esperanto-Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Sibille Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: sibille.bauer@esperanto.de
6-14.07.2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevėžys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt

17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden. Kutime ĉ. 150-200 gastoj, inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programeroj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj. Ĉifoje ĝi okazos en Königswinter apud la konata rivero Rejno.

Poludnica 2019. Tradicia vintra renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj ekde la jaro 1983. La kuranta kvara jardeko de la renkontiĝoj jam havas internacian karakteron kun riĉa kelktaga programo, kie krom turismaj programeroj estas pluraj sportaj aktivecoj, prelegoj pri vojaĝoj el la tuta mondo kaj informoj pri praktikaj scioj de vojaĝantoj.

Mirinda Lviv - en Lvov. Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia esperantista aranĝo organizata ekde 1959 laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kun riĉa kaj serioza movada, eduka, instrua, kultura kaj ekskursiva programo.

Oni eldonis

Libro

“Antaŭrintempo”

Aŭtoro: Stefan Žeromski

Tradukis Tomasz Chmielik

Eldoninto” Bialistoka Esperanto-
Societo

Eldonloko, eldonjaro: Bjalistoko


Lublin, Świdnik, Durdevac 2018

ISBN 978-83 63698-39-3

Projekto de la kovrilo: Przemysław

Wierzbowski

Formato 17,5x25 cm



Libro

“La tempo de la kaprinoj”

Aŭtoro: Luan Arif Starova

Tradukis Tomasz Chmielik

Eldonloko, eldonjaro: Bjalistoko

Lublin, Świdnik, Durdevac 2018

ISBN 978-83 63698-21-8

Projekto de la kovrilo: Przemysław

Wierzbowski

Formato 17,5x25 cm



Libro
“Landoj de l Fantazio”

Aŭtoro: Teo Jung

Tradukis Tomasz Chmielik

Eldonloko, eldonjaro: Bjalistoko

Lublin, Świdnik, Durdevac 2018

ISBN 978-83 63698-11-9

Projekto de la kovrilo: Przemysław

Wierzbowski

Formato 17,5x25 cm



Libro
“Songe sub pomarbo”

Aŭtoro: Julio Baghy

Tradukis Tomasz Chmielik

Eldoninto” Bialistoka Esperanto-
Societo

Eldonloko, eldonjaro: Bjalistoko

Lublin, Świdnik, Durdevac 2017

ISBN 978-83 63698-13-3

Projekto de la kovrilo: Przemysław

Wierzbowski

Formato 17,5x25 cm



Libro
“Hotelo Savoy”

Aŭtoro: Joseph Roth

Tradukis Tomasz Chmielik

Eldonloko, eldonjaro: Bjalistoko


Lublin, Świdnik, Durdevac 2017

ISBN 978-83 63698-15-7

Projekto de la kovrilo: Przemysław

Wierzbowski

Formato 17,5x25 cm



Broŝuro
„**Poemete**”

Aŭtoro: Maria Pawlikowska-
Jasnorzewska

Tradukis: Kazimierz Strzelecki

Eldoninto: Esperanto-Societo

Flamo

Eldonloko, eldonjaro: Toruń 2018

ISBN 978-83-63333-37-9

Grandeco A5 – 15x21 cm.




Estraro de PEA

Represo de „Sinjoro Tadeo”

En la 2018-a jaro ni festas la centan datrevenon de la unua Esperanto-eldono de "Pan Tadeusz" („Sinjoro Tadeo”) en la traduko de Antoni Grabowski. Dum 100 jaroj ĉi tiu libro estis publikigita kvar foje. La tria eldono en tre granda nombro aperis dum la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio en 1987. Kvaran eldonon tre bone preparita (kolora malmola kovrilo, tre bona papero) oni printis antaŭ du jaroj en malgranda kvanto de 100 kopioj, kiu plejparte estis sendita al UEA kaj ĝi estis preskaŭ neaĉetebla por polaj esperantistoj.

Nun ekzistas la ebleco denove presi la kvaran eldonon. Pola Esperanto-Asocio efektivas ĉi tiun taskon. Represi novajn 100 kopiojn eblas per la **sistemo de antaŭpago**. La prezo de la libro kun landa sendokosto estas 30 zlotoj. Bonvolu plusendi la



monon por la dezirata nombro de kopioj de "Pan Tadeusz" al speciala banko-konto de Pola Esperanto-Asocio kun noto "Pan Tadeusz". Post kolektado de la mono, PEA sendos ĝin al la presejo kun la ordono por presi librojn.

Jen numero de bankokonto PEA: 15 2130 0004 2001 0558 6110 0010
Volkswagen Bank ul. Gen. W. Andersa 37, 00-159 Varsovio

En nomo de la Ĉefa Estraro de PEA la sekretario Robert Kamiński

Robert Kamiński

Konata vortaro ankoraŭ aĉetebla

Estimataj amikoj, denove eblas aĉeti flavan vortaron "Obszerny słownik Polsko-Esperancki" kiun skribis Kazimierz Strzelecki kaj Maria Bonczol. La vortaro estas aĉetebla en Lodza Filio de Pola Esperanto-Asocio. La vortaro kostas 35 zlotojn (kun sendokosto). Bonvolu turni sin al Robert Kamiński, telefone 601 17 49 17 aŭ per interreto rk-lodzo@wp.pl



Forpasis

La 30-an de aŭgusto 2018, en Tychy, forpasis **Jan Kawka** - multjara, esperantisto kaj senlaca populariganto de Esperanto. La entombigo okazis la 7-an de septembro 2018, en la tombejo ĉe la str. Spółdzielcza 2 en Kępno.
Kun bedaŭro adiaŭas Lin Esperanto-Klubo en Tychy

Kun la granda malĝojo, ni informas pri la forpaso de nia kara, samideano **Tadeusz Wesse** - longjara esperantisto, prezidanto de la lodza filio de PEA. Li mortis la 10-an de septembro en Łódź. La funebra ceremonio okazis la 17-an de septembro 2018, je la horo 14:00, en la tombejo ĉe la str. Ogrodowa 39 en Łódź.
Kun bedaŭro, en la nomo de PEA, Robert Kamiński

10 manieroj por esti **FELIĈA**

Meditu;
reprogramu
vian cerbon

**Ekzercu vin ĉe la
RIDADO**

Planu vojaĝon,
sen realigi ĝin

DORMU
pli

**Ekzercu vin ĉe la
DANKEMO**

**Pasigu la tempon kun
la FAMILIO kaj la
AMIKOJ**

**Helpu
aliulojn
2 horojn
semajne**

**Translokiĝu pli
proksimen
al via laborloko**

IRU EKSTEREN
aparte je 13,9°C

Ekzercadu vin
minimume sep minutojn
tage





Foiro de Krepovo en Varsovio 30.09.2018



Elżbieta Karczewska rakontas al televida ĵurnalistino pri literatura konkurso

◀ Jerzy Handzlik kun filino Dominika koncertas dum Arkones



Maciej Szupica aŭtoro de nova murprentaĵo en Bjalistoko

NIA FOTOGALERIO 103-a Universala Kongreso en Lisbono

